

Saluton!

Dankon, ke vi interesiĝas pri la **Esperanto–Tago**, kaj ke vi deziras kunlabori en la necesa kaj laŭeble plej vasta informado pri ĝi: rete kaj en la reala vivo, en via ĉirkaŭaĵo kaj al viaj kontaktoj.

Afiŝaj tekstoj:



La tradukendaj vortoj por la afiŝo estas:

<i>en</i> <i>Esperanto</i>	<i>en Via lingvo, kiu estas:</i> ...
ESPERANTO	
Monda lingvo por dialogo kaj paco	
26a de julio – ESPERANTO–TAGO – tago de Lingva Justeco	
Universala Esperanto–Asocio	
Informoj	

--- Reta adreso de tiu ĉi traduka laborfolio: en [WORD](#) ; [PDF](#) ---

*Jen ĉi-tiu versio de la afiŝo, en du grandecoj, en **Esperanto**,
por via uzo kaj vasta diskonigo:*

a) *Afiŝo **granda**, ekz. por A3-grandeca presado,
uzenda en surstrata informado, sur afiŝtabuloj, informbudoj,
en bibliotekoj, universitatoj, ktp.:*

<http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/2022/ESPERANTO-TAGO-2022-Lingva-Justeco--granda.jpg>

tiu adreso mallongigita: <https://bit.ly/Esperanto-Tago-2022-granda>

b) *Afiŝo, **reta grandeco***

*uzenda laŭeble en multaj retaj ebloj, kaj en retmesaĝoj
(kiel ekz. Subskribaĵo, aŭ komence/super de/la mesaĝo), ktp.:*

<http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/2022/ESPERANTO-TAGO-2022-Lingva-Justeco--reta.jpg>

tiu adreso mallongigita: <https://bit.ly/Esperanto-Tago-2022-reta>

Bonvolu sendi al ni ĉi tiun dokumenton, kun viaj tradukaĵoj sur ĝi
en *Word*-a versio, **kaj** en *PDF*-versio
al tiuj 2 retadresoj:

gazetaro @ linguistic-rights *punkto* org

(tio iros al Stefano Keller, prizorganto de la retejo www.linguistic-rights.org)

kaj al

renato @ esperanto *punkto* org (kiu iros al Renato Corsetti)

Dankon por via kunlaboro pri la afiŝo! (Tio estas la pli urĝa)

--- --

Se, post la resendo al ni de via tradukaĵo de la afiŝtekstetoj,
vi tradukus ankaŭ

la Klarigan tekston pri la tago, tiam vidu kaj bv. uzi la sekvon de tiu ĉi dokumento:

KLARIGA TEKSTO pri la ESPERANTO-TAGO

Por traduki la ĉi-suban *klarigan tekston* pri la *ESPERANTO-TAGO*, bonvolu enskribi viajn tradukfrazojn (per via-alfabetaj literoj) en la opajn tabeletojn sub la koncerna tradukenda alineo.

– Post la fino de la klariga teksto, bonvolu aldoni – *vialingve* – lokajn, vialandajn esperantajn kontaktojn, adresojn de esperanto-kursoj vialandaj, de lokaj grupoj, ankaŭ la retan adreson de informejo, asocio/centro/klubo vialanda pri Esperanto, ktp. Tiuj informoj aperos sub vialingva versio de la *Klariga teksto*, kaj per ties helpo la interesiĝantoj povos pluesplori, kontakti tiujn esperantejojn, informlokojn.

La QR-Kodo en la maldekstra supro de *la esperanto-versia* afiŝo donas la ligon al la listo de landaj asocioj de UEA. Sed, post ricevo de via tradukversio kaj lokaj kontaktinformoj, la *vialingvigita versio de la klariga teksto* (kion eble vi akceptos pretigi) estos do ligita al la nova QR-kodo sur vialingva afiŝo, kaj post la klariga teksto troviĝos ankaŭ la informoj pri vialandaj Esperanto-kursoj, kaj pri lokaj kontaktoj (kiujn vi bv. meti en la tradukfolion post la klariga teksto).

Ne forgesu aldoni vian nomon, landon (vialingve kaj esperante), se vi akceptas, ke tio estu publikigita sub la tradukita klariga teksto ("*En la ... lingvon tradukis: ...*").

***Kun GRANDA antaŭ-DANKO por via grava – kaj necesa – kunlaboro,
Renato Corsetti kaj Stefano Keller***

ET2022 (26a de julio 2022) – Klariga teksto kaj lokaj informoj

↓ *Sur la sekvaj paĝoj estas: la Klariga teksto tradukenda* ↓

Bonvolu tajpi per *via alfabeto*, en *via lingvo* **la titolon**, la opajn alineojn en la kvadraton kiu troviĝas sub ĉiu alineo. La vortojn, frazojn skribitaj en *oblikva formo*, bv. *oblikve* skribu ankaŭ vialingve, se eblas.

Via lingvo estas:

esperante: vialingve:

Komenco de la tradukenda teksto (ankaŭ ĉi tiu titolfrazeto) :

26a de julio – Esperanto–Tago, tago de Lingva Justeco

Kial la Esperanto–Tago? – Kial ĝi estas grava por la tuta mondo nun?

La 26an de julio 1887 aperis la unua libro pri la *internacia lingvo Esperanto*. Esperanto estas proponata por uzo en rilatoj inter personoj de malsamaj denaskaj lingvoj, kiuj tiel neŭtrale kaj lingve egalrajtece interparolus, kaj la komunikado inter ili estus *justa*. Neniu rajtas senti sin supera al la alia.

Ni, esperanto–parolantoj, proponas al la mondo festi la 26–an de julio kiel la tagon de Lingva Justeco, de justaj interrilatoj kulturaj, popolaj, etnaj. Justa komunikado estas la situacio, en kiu ĉiuj interparolantoj disponas pri la samaj lingvaj eblecoj sin esprimi. Estas klare, ke, se iuj rajtas paroli en sia denaska lingvo, dum aliaj devas uzi la denaskan lingvon de la alilingvanoj, tiam ne ekzistas tia situacio de egaleco.

Elektante kaj metante unu aŭ kelkajn lingvojn super la aliajn, oni signalas la pli grandan gravecon aŭ la regadon fare de la denaskaj uzantoj de tiuj lingvoj. Tiu elekto fariĝas rimedo por ekskludi homojn el politiko, edukado, aliro al komercado kaj multaj aliaj aspektoj de la socia vivo. Ĝi fortigas sociajn-ekonomiajn malegalecojn inter homgrupoj.

Ekzistas *lingvaj homaj rajtoj* kaj ekzistas *homaj rajtoj kun lingva enhavo*. Libereco de sinesprimado kaj la rajto uzi sian denaskan lingvon estas nedisigeblaj.

Spertoj ĉirkaŭ la mondo montras, ke plurlingvaj politikoj povas pliampleksigi ŝancojn por homoj en multaj manieroj. Tio, kion egaleca mondo bezonas, estas formulo, cetere rekomendita de *UNESKO*, kiu donas publikan agnoskon al la uzado de ĉiuj lingvoj: *gepatra, landa/regiona kaj internacia*.

- a) *Gepatra lingvo*. Ĉiu deziras kaj bezonas povi uzi sian gepatran lingvon, kiam tiu ĉi estas nek la regiona nek la internacia lingvo, en kiel eble plej multaj situacioj. Infanoj en elementaj lernejoj rajtas ricevi instruon en la hejma lingvo.

b) *Landa/regiona lingvo*. Lingvo de loka ligado faciligas komunikadon inter malsamaj lingvogrupoj – kiel ekzemple la svahila en orientafrikaj landoj, kie ankaŭ multaj aliaj lingvoj estas parolataj.

c) *Internacia lingvo*. En tiu ĉi epoko de facila internacia komunikado, ĉiuj homoj devas havi la rajton uzi *neŭtralan internacian lingvon*, kiu situigas la popolojn je la sama nivelo, kiam temas pri internacia komunikado kaj kultura interŝanĝado.

Registaroj devas agnoski ĉiujn uzatajn lingvojn kaj laŭeble faciligi ties instruadon kaj uzadon en la vivo. Ekzistas multaj versioj de tiaj plurlingvaj formuloj, depende de la lando. Dum estas eble kaj eĉ dezirinde, ke ŝtato restu "neŭtrala" pri etneco kaj religio, tio ĉi estas neebla pri lingvoj. La homoj en la mondo kaj la civitanaro en la unuopaj landoj bezonas komunan lingvon por antaŭenigi reciprokan interkomprenon kaj efikan komunikadon, sed samtempe ili rajtas utiligi sian gepatran lingvon.

La *internacia lingvo Esperanto* estas ilo neŭtrala, kies uzo realigas la lingvajn homajn rajtojn je internacia, interpopola nivelo.

– *"El ĉiuj planlingvoj de la mondo Esperanto estas hodiaŭ la plej konata kaj la plej uzata. Laŭ mi, ĝi alportos multajn avantaĝojn, se la homoj konsideros ĝin serioze. ...Esperanto bezonas malpli da lernotempo ol iu ajn 'naturo' lingvo, ĉar ĝi estas regula kaj logika, ne havas esceptojn. Tamen, oni povas en Esperanto diri ĉion, kion oni volas [...]"* – laŭ la monde konata lingvistino *Dr. Tove Skutnabb-Kangas*.

Krome, Esperanto malhelpas la hegemonion de la momente grandaj potencoj.

– *"Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiuj lingvoj, estas la celo, al kiu Esperanto signife kontribuas."* – laŭ alia konata lingvisto, *Dr. Robert Phillipson*.

Estas tempo ĉesi pensi laŭ la nuntempa maniero, ni devas komenci starigi situacion de egaleco inter ĉiuj popoloj de la mondo.

ESPERANTO estas ilo por atingi, realigi justan komunikadon.

Okaze de la ESPERANTO-TAGO, 26a de julio 2022.

----- fino de la Klariga teksto -----

Bonvolu sendi al ni ĉi-tiun dokumenton, kun viaj tradukaĵoj sur ĝi
en *Word-a versio*, **kaj** en *PDF-versio*
al tiuj 2 retadresoĵ:
gazetaro @ linguistic-rights punkto org
(tio iros al Stefano Keller, prizorganto de la retejo www.linguistic-rights.org)
kaj ankaŭ al
renato @ esperanto punkto org (kiu iros al Renato Corsetti)



Grandan dankon por via helpo!

Renato CORSETTI kaj Stefano KELLER

*Vialingva afiŝo – en la pli supre indikitaj grandecoj –
(kaj ĉi-tiu klariga teksto, se vi akceptis traduki ankaŭ tion),
aperos baldaŭ sur tiu retpaĝo:*

<http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2022.html>

Reta adreso de tiu ĉi traduka laborfolio:

<https://bit.ly/ET2022-tradukendajhoj-WORD>

Ties kopio en PDF

*(por kontrolo de la WORD-a laborfolio, kiun vi elŝutis,
okaze de uzo de komputilo kun malsamtipaj (ĉina, japana, bulgara, araba, ktp.)
alfabetoj:*

<https://bit.ly/ET2022-tradukendajhoj-PDF>